



Spertoj de amatora lobianto



**Impona popolfesto
en Monso**



**Genetika analizo
konfirmas la originon
de HIV-1**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Spertoj de amatora lobianto 12

Komence de 2007 la aŭtoro ricevis inviton por partopreni tutsemajnan aranĝon en Bruselo pri la projektoj de la Eŭropa Komisiono rilate al zorgego uzo de energio. Kvankam ne esti fakulo pri tiu temo, estis ŝanco por konatiĝi kun medio, kiun oni konas nur el gazetaj artikoloj kaj televidaj programoj. Ankaŭ estis interese fari komparon kun aliaj tutsemajnaj konferencoj, kiujn li kutimas partopreni.



Impona popolfesto en Monso 14

Monso estas belega belga urbeto, situanta inter Lille, en Francio, kaj Bruselo, en Belgio.



En ĝi ĉiujare dum Trinitato (la dimanĉo post Pentekosto) okazas granda procesio enkadre de grandioza popolfesto. Kaj tio jam daŭras jarcentojn. La festo estas rekonata de Unesko kiel „ĉefverko de parola kaj nemateria komunuma heredaĵo de la homaro” ekde la jaro 2005.

Atendinda solvo por kompleksega problemo 16

Konstanta plado de internaciaj kunvenoj de biologoj, botanikistoj, virologoj, bakteriologoj, paleontologoj ktp, same kiel de apartfakaj interkonsiliĝoj, estas la scienca (t.e. greklatina) nomdonado al disbranĉiĝoj kaj specioj. Nun oni agnoskas la ekziston de jam kvin „regnoj”: Monera, Protista, Fungi, Plantae, Animalia. Do necesas kiom eble plej unueciigi.

Genetika analizo konfirmas la originon de HIV-1 18

Internacia teamo de sciencistoj konfirmis, ke la homa HIV-1-viruso, la kaŭzo de aidoso, devenas el la similspeca



SIVcpz-a viruso de ĉimpanzoj. Kvankam tiu fakto jam longe estis supozata, solidaj pruvoj mankis, ĉar nur malmultaj kaptitaj ĉimpanzoj fakte portis SIVcpz.

POLITIKO

Naciismo 8
El intestoj - laĉoj

Albanio 8
Tria triumfo

MODERNA VIVO

Eŭropa Unio 9
Litovio, ĉu Mitovio?

Demografio 9
In-terese

Loĝado 10
Porteblaj hejmoj

Balkanio 11
Duonkore donata

Kuirarto 11
Altpreza pico-peco

ESEO

Eŭropa Unio 12
Spertoj de amatora lobianto

TURISMO

Belgio 14
Impona popolfesto en Monso

SCIENCO

Atendinda solvo por kompleksega problemo 16

Robota mano regata de pensoj 17

Medicino 18
Genetika analizo konfirmas la originon de HIV-1

LIBROJ

Mi estas homo 19

Kio estas sklavoj kaj kiu estis Kristo 21

ARTO

Konata voĉo ree sonas 22

Knabinoj, cignoj, burĝonoj 23

NOVELO

Busvojaĝo 24

Abonoj 4

Enkonduko 5

Leteroj 6

El mia vidpunkto 7

Anoncetoj 27

Vizitu
www.Monato.net
kun novaj kontribuoj ĉiutage!

Senpagan pasporton por viziti la paĝojn
vi petu de monato@monato.net.
Menciu vian FEL-kodon, kiun vi
trovos supre sur la adreŝilpo.

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (ebblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifo

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalia	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelsö, 5 Craighenhill Road, Kincadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - **Hilde** Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - **Hans** Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - **Wolfgang** Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wa-
- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - **Halina** R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - **Mikaelo** Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - **Esperanto-Skolan,** Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleeodorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj.:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Noto:** Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Malpermesoj



Ĉu vi jam rimarkis, ke ni vivas en epoko de malpermesoj? En Germanio pro plendoj de nekristanoj oni malpermesis krucifiksojn en klas-ĉambroj. (Kiam venos malpermeso de vojkruciĝoj?) En pluraj landoj oni malpermesis al islamanoj instruistinoj porti kap-tukojn (en Turkio tiuj tukoj en universitatoj estas malpermesitaj). En iuj usonaj lernejoj darvinismo estas malpermesita. Jam en multaj landoj oni malpermesis fumadon en publikaj konstruaĵoj kaj restoracioj. En mia urbo oni malpermesis forĵeti cigaredstumpon aŭ maĉgumon sur la strato (se vi faras, vi riskas altan monpunon). Flugpasaĝeroj ne rajtas kunporti normalajn botelojn kun fluidaĵo. En Germanio oni diskutas pri rapidlimigo por aŭtoj, kiu validas jam en multaj aliaj landoj. Sed en Germanio pro konstanta trafikŝtopiĝo sur aŭtovojoj oni praktike pli multe staras, ol veturas ... En Eŭropa Unio (EU), protagonisto de malpermesoj, oni nun ankaŭ diskutas pri malpermeso de alkoholaĵoj, almenaŭ por junaj homoj. (Ni memoras, ke en Usono iam ĉia alkoholaĵo estis malpermesita – kial ne plu?) En EU-landoj baldaŭ oni malpermesos al aŭtoj, kiuj ellasas tro grandan kvanton da veneno kaj fulgo, veturi en urbocentrojn dum tagoj kun tre multa mikropolvero en la aero. Mi demandas min, kial ili dum la aliaj tagoj rajtas polui la medion. Grandioza ekzemplo de sagaca malpermeso estas, ke en Germanio oni ne rajtas uzi aŭtojn sen vintraj pneŭmatikoj, kiam neĝas. Ĉar pro la klimatsanĝiĝo en plej granda parto de Germanio ne plu neĝas, tiu malpermeso validas nur dum kelkaj tagoj jare (sed kiu scias antaŭe, dum kiuj tagoj?).

Nu ja, iuj malpermesoj ja estas pravaj (ekzemple pri fumado), sed mi demandas min, kiujn limigojn de nia individua libereco ni ankoraŭ devos suferi? Kaj kiu kontrolas ĉiujn ĉi malpermesojn? Ĉu ni devas por tio rekrutigi armeon da denunciintoj? Cetere, mi havas pliajn prudentajn proponojn por malpermeso. Ekzemple oni povus malpermesi stultigajn televidprogramojn kaj rubaĵon en Interreto. Kaj oni devus malpermesi al bestoj kaj homoj furzadon, ĉar ties intestaj gasoj venenas la aeron. Tamen ion mi ne atendas: ke oni malpermesos homan stultecon ĝenerale kaj militon aparte.

Sincere via

Stefan MAUL

La tri turoj de MKC

Mi legis la eseon *Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?* de Ian Fantom (MONATO 2007/4, p. 24-26). Kiu plu interesiĝas pri la temo, rigardu la (anglalingvan) retejon www.loosechange911.com.

Detlev BLANKE
Germanio

Kiu estos punita?

Navin Shrestha demandas, kiu punos tiujn, kiuj mortigis pli ol ses milionojn da homoj en Irako (MONATO 2007/3, p. 6). Neniu scias ekzakte, kiom da homoj mortis en Irako, sed certe ne ses milionoj. La 16an de marto la kalkulilo de la retejo *Iraq Body Count* (www.iraqbodycount.org) atingis 64 729 viktimojn, sed ekzistas pluraj aliaj taksoj. La plej alta cifero troveblas en (cetere tre kritikita) studo aperinta en *The Lancet* (www.thelancet).

com) la 21an de oktobro 2006. Laŭ ĝi estis pli ol 650 000 viktimoj. Amiko estas kara, sed vero pli kara ...

André RUYSSCHAERT
Luksemburgo

Restu tajloro ĉe via laboro

Don Broadribb estas, sendube, tre klera kaj lerta kunlaboranto de MONATO. Tamen koncerne recenzojn estas jena principo dezirinda: Por la juĝo de la tradukvalito, egale el kiu lingvo io estas tradukita, estas tre grave, ke la originala lingvo ĝuste estu la gepatra lingvo de la recenzanto. Ekzemple por la traduko de la fama Eŭgeno Onegin Boris Kolker estus konvena recenzanto. Koncerne tradukojn el anglalingvaj verkoj sendube Donald Broadribb estas tre kompetenta prijuĝanto.

Bertil ENGLUND
Germanio

Lasta manovro

Interesa estas la artikolo *Lasta manovro* (MONATO 2007/1, p. 8), sed nesufiĉe preciza. Notindas, ke:

1. la nova konstitucio de Serbio estas subtenata de sufiĉa plimulto da loĝantoj, kion konstatis ĉiuj internaciaj institucioj; ja ne eblas, ke ĝi estis trudita de malplimulto;

2. la prokrasto difini la statuson de Kosovo okazis pro la deziro de albanaj politikistoj, ke Kosovo estu apartigita de Serbio. Tio estas neakceptebla laŭ la Ĉarto de UN, la Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo kaj internacia juro. Sen tio Kosovo ricevus rapide sian statuson;

3. menciendas la jaro 1912, kiam Serbio sukcesis forpeli turkajn okupintojn el Kosovo kaj Metohio (Kosmet). Kvankam albanoj loĝis en serba Kosmet dum la turka okupacio, kaj armeo servis turkojn, Serbio ne forpelis ilin. Same okazis kun albanoj en Makedonio kaj Grekio.

Por sekurigi pacon ne permeseblas redifini ŝtatajn limojn. Al Kosmet necesas revenigi ĉirkaŭ 200 000 forpelitajn serbojn, kies domojn kaj kulturajn monumentojn detruis albanoj.

Gavrilo POPOVIĆ
kaj Atanasije MARJANOVIĆ
Serbio

DONACKUPONO

Donaco por via korespondamiko?
Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiu tiel afable gastigis vin?
Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

NOVAĴO

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Adaptiĝo

de Stefan MAUL

Ĉu vi legis la alarman raporton de la Interregistara Komisiono pri Klimat-Ŝanĝo (konata per la angla mallongigo IPCC)? Mi lernis per ĝi, ke definitive oni ne plu povas haltigi tiun ŝanĝon, eĉ se oni tuj farus ĉion eblan por redukti emision de venenoj kaj simile – simple estas tro malfrue. Maksimуме oni povus iom bremsi la katastrofan evoluon. Do mi krome konkludas el la raporto de tiu monda klimat-konsilio, ke ni devas vivi kun la sekvoj, kaj tio signifas, ke ni devas adaptiĝi al la klimat-ŝanĝo.

La demando estas, kion mi persone povas kaj devas fari en tia situacio. Kio atendas min, vivantan en meza Eŭropo, en grandurbo situanta inter Danubo kaj la Alpoj? Nia vetero jam de jaroj ŝanĝiĝas: sezonoj ne plu estas samaj kiel en mia junaĝo; ni nun havas mildajn vintrojn kaj varmegajn somerojn. La sledojn ni povas bruligi, ĉar en nia regiono preskaŭ ne plu neĝas; se niaj genepoj volas sledi, ni devus veturi al la Alpoj (kaj eĉ tie ofte mankas neĝo) – sed nia aŭto ja venenas la atmosferon kaj do tiel ni damaĝus la klimaton. Do fino de la vintra amuzaĵo por infanoj! Sed la vetero kapricas; pasintan jaron en marto (printempa monato ĉi tie) dum du semajnoj ni havis abundan neĝon kaj froston. Sekve infanoj tamen povis sledi, sed la floroj de nia pomarbo frostiĝis, tiel ke en aŭtuno ni rikoltis nur manplenon da fruktoj ...

Abeloj mortas

Cetere mortis ankaŭ abeloj, ĉar ili ne trovis (post la frosto) sufiĉe da nutraĵo. Ĉi-jare ni havis varmajn januaron kaj februaron, do abeloj vekiĝis pli frue el vintra dormo ol kutime; sed ne ĉiuj planoj jam adaptiĝis al la klimat-ŝanĝo, kaj do denove kompatindaj abeloj ne trovas la necesan nektaron, kaj denove ili mal-sat-mortas. Do baldaŭ ni devos rezigni pri

mielo aŭ akiri multekostan importitan naturan dolĉaĵon. Kaj denove ni havos eble nur malmultajn pomojn el nia arbo.

Politikistoj apelacias al ni ŝpari energion. Do ni aĉetis novan fridujon, sur kiu ni legas „super-eko” kun la epiteto „energi-ŝpara”. En nia loĝejo jam de multaj jaroj ni uzas tiel nomatajn ŝpar-ampolojn, sed nur tie, kie ni ofte kaj multe bezonas lumon vespere kaj nokte. Nun en Aŭstralio oni jam malpermesas ĉiujn ordinarajn elektrajn ampolojn, ĉe ni oni (ĝis nun) nur konsilas. Do ni aĉetos pliajn multekostajn ŝparampolojn por savi la naturon. Sed kion fari pri malnovaj tamen ankoraŭ perfekte funkciantaj elektraj aparatoj, kiuj voras energion? Niaj modestaj pensioj ne permesas al ni forĵeti ilin kaj aĉeti novajn. Ĉu do ni plu kulpu pri energi-malŝparo?

Klimatiziloj?

Aliflanke, pro la nun pli varmaj vintroj ni ŝparas aŭtomate hejt-energion. Sed kio pri la nun varmegaj someroj? Ĉu ni ŝvitu malnormale aŭ instalu energivorajn klimatizilojn por elteni la temperaturojn? Se ni tre multe ŝvitas, ni devas pli multe lavi vestaĵojn – kaj denove konsumas energion (tamen nia relative nova lavmaŝino ankaŭ estas „energi-ŝpara” laŭ aserto de la produktinto). Cetere, ni certe akiros pliajn kulo-retojn por protekti ne nur nian dormĉambron, sed ankaŭ ĉiujn fenestrojn kontraŭ la baldaŭ abundaj pikuloj. Kiel multaj germanoj pasint-tempe ni ofte libertempis en varmaj sudeŭropaj landoj. Nun ni povas resti hejme kaj ĝui propran varmon; sed pro tio suferos turisma industrio en sudeŭropaj landoj – ĉu ni rajtas damaĝi tiel italojn, grekojn kaj hispanojn?

Aliflanke tiamaniere ni ne plu damaĝas la atmosferon, ĉar ni ne plu

flugos. Hejme jam de multaj jaroj ni uzas nian aŭton nur en urĝaj okazoj, ceterokaze biciklas aŭ uzas tramon kaj buson. En nia granda urbo ni bonŝancas tiurilate. Sed por viziti nian ferian domon je 30 km sude de Aŭsburgo ni devas uzi la aŭton; per trajno aŭ buso ni ne povas atingi ĝin, por bicikli la distanco estas tro granda. Tamen tie ni konsumus malpli da energio, ekzemple ĉar ni hejtas la domon per ligno, kiu ne tiom poluas la aeron. Ĉu ni, pensiuloj, do translokiĝu tien? Sed loĝi en la vilaĝeto sen aŭto ne eblas, ĉar krom viandaĵon kaj panon ni povas preskaŭ nenion aĉeti pro manko de vendejoj; do ni devus uzi aŭton por atingi superbazarojn en urboj – jen la sama dilemo.

Piroj el Argentino?

Ho jes, superbazaro! Tie oni ofertas nutraĵojn el la tuta mondo. Sed ĉu plu ni rajtas aĉeti produktojn el foraj landoj, kiujn oni importas per konsumado de multa energio? Ĉu ni rajtas aĉeti tomatojn kaj oranĝojn el suda Hispanio, se fridkamionoj dum mil-kilometra veturado poluas la atmosferon kaj tiel varmigas ĝin pli? Ĉu plu mi rajtas manĝi pirojn el Sud-Afriko aŭ Argentino?

Abundas konsiloj por helpi la naturon. Ekzemple oni rekomendas al ni vojaĝi ne per aŭto, sed per trajno. Por viziti parencojn en distanco de ĉirkaŭ 500 km mi povas veturi per trajno; tio kostas malpli ol uzi la aŭton. Sed se ni vojaĝas duope, por la trajno ni pagas konsiderinde pli da mono, ol per la aŭto, kiu sampreze transportas unu aŭ kvin personojn.

Ne, vere ne estas facile por ni, ordinaraj homoj, kontraŭbatali la klimat-ŝanĝon. Do ni adaptiĝu al pli multaj uraganoj, fortaj pluvegoj kaj inundoj. Kaj eble, eble, ja ankaŭ registaroj lernas el la raporto de la monda klimat-konsilio ... ■

El intestoj – laĉoj

Antaŭ nelonge albano loĝanta en Stokholmo serĉis interrete informojn pri armeoj de la Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Li trovis filmon pri trejnado de greka

taĉmento apud la turka landlimo. La grekaj soldatoj kantis kontraŭalbanajn kaj kontraŭturkajn kantojn.

La grekoj kantis, ke ili faros laĉojn el la intestoj de albanoj kaj ŝuojn el la

haŭto de „otomanoj”. La albano informis grekajn kaj albanajn amaskomunikilojn pri la vidbendo. La greka ĵurnalo *Ta Nea* publikigis la informojn, kaj ankaŭ albanaj televidaj stacioj dissendis erojn el la vidbendo. Forte koleris albanoj.

Oficiro

Unu semajnon poste manifestaciis albanaj junuloj laborantaj en Grekio. Bruligita estas la greka flago. La greka registaro kondukis prudente, atendante reagon kaj respondon de koncernaj homoj kaj institucioj. La greka oficiro, kiu enmetis la vidbendon en Interreton, klarigis, ke tion li faris por entuziasmigi siajn soldatojn.

Laŭ albanoj, la vidbendo – nun retirita, sed plena de malamo kontraŭ albanoj kaj turkoj – indikas, kiel edukiĝas grekaj soldatoj. Albanoj kredas, ke ankoraŭ regas ŝovinismo kaj rasismo en politikaj kaj edukaj rondoj en Grekio. Antaŭ unu jaro estis murdita albana junulo sur la insulo Kreto, ĉar li portis bluzon surhavantan la albanan nacian standardon.

Bardhyl SELIMI



PETER MACINNIS

ALBANIO

Tria triumfo

Post maratona antaŭbalota kampanjo elektiĝis Edi Rama jam la trian fojon urbestro de Tirano. Li kandidatiĝis sub egido de la Socialista Partio, kiun li prezidis, kiam en 2005 la demokratoj gajnis la plimulton en la albana parlamento.

Sukcesis Rama malgraŭ kritikoj kaj akuzoj rilate konduton kaj personan kaj publikan. Kvarfoje divorcinta, li

neglektis urbajn planojn kaj permesis liberan konstruon de altaj domoj, kio sufokas la ĉefurbon. Tamen li akiris eksterlande reputacion de unu el la plej kapablaj urbestroj en Eŭropo.

La kandidato de la demokrata koalicio Sokol Ollashi, pli juna, kun modela familia vivo, kaj eksa sukcesa ministro pri internaj aferoj, malvenkis. Tamen ekster Tirano la opozicia koa-

licio venkis en ĉiuj gravaj urboj de la lando.

La venontaj parlamentaj balotoj okazos en 2009. Intertempe albanoj scivolas, kiel post multekosta elekta kampanjo la nova urbestro gvidos kaj la urbon kaj la Socialistan Partion.

Bardhyl SELIMI

Litovio, ĉu Mitovio?

Jen ĝusta bildo pri Litovio, kiun plej bizare konceptas eksterlandanoj.

Por multaj eksterlandanoj Litovio estas nekonata kaj fojfoje eĉ mita lando, nekomprenata kaj misrepresentata en filmoj kaj libroj. Tion indikas enketoj en 18 landoj de la Eŭropa Unio.

Ekzemple en la romano *Hannibal*, sur kiu filme baziĝas la kanibalo Hannibal Lecter, la aŭtoro Thomas Harris nomas litovojn jen baltoj, jen slavoj. Menciataj estas geografiaj nomoj ne tipaj por Litovio. La bieno apud Vilnius, de kie venas la Lecter-familio, asociiĝas kun tipe gotika franca kasteleto. Familiaj nomoj en la romano sonas pli internacie ol litove, kaj kantoj en la filmo rilatas pli al germana folkloro ol la litova.

La hollywooda aktoro Mel Gibson antaŭ kelkaj jaroj en intervjuo parolis pri „akradentaj litovoj, armitaj per basbalaj bastonoj”. Cetere en filmo „Infanoj el la 402a klaso” oni prezentis rusajn specialaĵojn, kvazaŭ ili estus litovaj. Kaj irlanda gazeto en 2004 publikigis artikolon, en kiu Litovio estis prezentata kiel lando de malfeliĉuloj, sur kies stratoj ruliĝis nur malnovaj rusaj aŭtoj kaj kie, finstudinte, junuloj povis nur lavi telerojn, ĉar alia laboro mankas.

Manĝi ĉevalaĵon

Usona verkisto, Jonathan Franzen, en *Korektoj* aperinta en 2001, notis, ke Vilnius estas urbo regata de banditoj. Krome la ĉefurbanoj suferas pro manko de nutraĵo kaj estas devigataj manĝi ĉevalaĵon.

Laŭ la enketoj, litovoj kapablas solvi komplikajn vivsituationojn kaj obstine atingas siajn celojn. Substrekitaj

estas la allogo kaj la stilo de litovinoj, samtempe tamen krudo, malatento kaj manko de kapablo flanke de litovaj viroj respekti virinojn.

Litovion oni ne taksas sporta lando. Nur litovoj mem opinias, ke ili estas bonaj sportistoj. Supozeble la rezulto de enketoj helpas al litovoj krei ĝustan bildon pri si.

Laimius STRAŽNICKAS

DEMOGRAFIO

In-terese ...

Komence de 2007 en Litovio loĝis 1 807 000 virinoj. Tio signifas, ke virinoj superis virojn je 229 000, do por 100 viroj estis 115 inoj.

Ĉu inoj superas virojn nur kvante? Tute ne. Inoj distingiĝas per plia emo al studado; viroj tamen al pli ofta uzo de komputiloj kaj Interreto.

Cetere ĉirkaŭ 60 % de la litovaj studentoj kaj 58 % de la doktoriĝintoj estas virinoj.

Virinoj koncentriĝas precipe en urboj: en kelkaj kvartaloj estas por 100 viroj 120 inoj. En 2006 la meza aĝo de litova virino estis 40,7 jaroj, de viro 35,9.

last

LOĜADO

Porteblaj hejmoj

En Finnlando la entrepreno *Teijo-talot* (*talot* = domoj) patentigis novan manieron transporti tutan domon el fabriko al elektita loĝloko.

Por tio bezonatas kvinaksa veturilo kaj hidraŭlikaj leviloj, per kiuj eblas precize kaj senskue meti la domon sur preparitan gruzobazon. La bazo havu akvotubojn, deflutubojn kaj elektrajn dratojn pretaj por konekti, antaŭ ol la domo estos surmetata. La tekniko taŭgas por transportado de ne tro grandaj konstruaĵoj, ĉar la dimensioj de la veturilo kaj la aŭtovojoj limigas la eblojn. La entrepreno disponigas kvin domomodelojn al aĉetantoj.

Nuklea centralo

La firmao fabrikas el ligno kioskojn, garaĝojn, stokejojn, kafejojn kaj saŭnojn, aldone al la familiaj kaj aliaj loĝdomoj. Ĝi transportis al la kons-



WWW.TEJO-TALOT.FI



TEOLLISUUDEN VOIMA OY

truejo de la nuklea centralo en Olkiluoto 40 domojn por la laboristoj, kelkaj el ili eksterlandanoj, kiuj loĝos tie dum du aŭ tri jaroj. Kiam la centralo estos preta, la domoj estos transportataj aliloken.

La tuta domo estas konstruita, farbita kaj laŭvole ankaŭ meblita en la fabriko. Fenestroj, pordoj, fajrujoj, plankoj, murpaperoj kaj lampoj estas pretigataj laŭ la deziroj de la aĉetinto. Nek aĉa vetero, nek pluvo aŭ frostoj povas plilongigi la konstrutempon aŭ damaĝi la konstruaĵon. Eblas tuj ekloĝi, kaj nek ruboj, nek malordo malbeligas la ĉirkaŭaĵon. Se la posedanto post kelkaj jaroj deziras translokiĝi, eblas kunpreni la domon.

SALIKO

La nuklea centralo en Olkiluoto



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

Duonkore donata

F infine estas prezentita la plano de Martti Ahtisaari, la speciala komisiito de Unuiĝintaj Nacioj (UN) pri la statuso de Kosovo. La plano tamen apenaŭ mencias la vortojn „sendependeco” kaj „suvereneco”, kiujn la albanoj en Kosovo longe prirevas kaj atendas.

Cetere la plano enhavas multon konfuzan, ambiguan kaj dubindan, kio povus endanĝerigi la estontecon de nova Kosovo. Albana eminentulo, la internacie konata verkisto Ismail Kadare, atentigas, ke rimarkeblas neglekto rilate albanojn, ke tio donata al albanoj estas kvazaŭ duonkore donata. Apenaŭ menciataj estas ilia nomo, ilia kultura heredaĵo kaj ilia lingvo.

Emfazata en la plano estas la serba malplimulto kaj ĝia heredaĵo, parlamentaj seĝoj, preĝejoj kaj municipoj. Tial ne senmotive okazis en Priština en



La sidejo de UNMIK en Priština

februaro kaj marto popolaj manifestacioj de albanoj. Dum la unua manifestacio mortis du albanaj junuloj pro la reago de UN-policianoj (ĉefe ukrainaj policistoj).

La albanoj esperas, ke la junuloj estos la lastaj martiroj de la longe suferanta albana popolo de Kosovo, sopiranta pri propra ŝtato.

Bardhyl SELIMI

Altpreza pico-peco

Prezentita al la novjorka publiko estas pico kun valoro de 1000 usonaj dolaroj (ĉ. 750 eŭroj). Kreis ĝin albana elmigrinto, Nino Selimaj, el ses kaviaro-specoj. La pico, havanta diametron de 30 cm, estas dividita en ok partojn. Ĉiu peco kostis ekvivalenton de preskaŭ 100 eŭroj.

„Mi scias, ke tion povas aĉeti nur malmultaj, tamen ekzistas homoj, kiuj, ĝin manĝinte, deziras ĝin denove havi,” diris Selimaj. Li esploris dum unu jaro, ĝis li trovis la ĝustajn ingrediencojn. Necesas mendi la picon 24 horojn antaŭ ol ĝin manĝi, por ke la kuiristoj trovu la ĝustan kaviaron.

Bardhyl SELIMI



Spertoj de amatora lobianto

Komence de 2007 mi ricevis inviton por partopreni tutsemajnan aranĝon en Bruselo pri la projektoj de la Eŭropa Komisiono rilate al zorga uzo de energio. Kvankam mi ne estas fakulo pri tiu temo, estis ŝanco por konatiĝi kun medio, kiun oni konas nur el gazetaj artikoloj kaj televidaj programoj. Ankaŭ estis interese fari komparon kun aliaj tutsemajnaj konferencoj, kiujn mi kutimas partopreni.

La Tuluzostrato, vidata de la urbocentro: tute normala loĝstrato kun bone prizorgataj domoj.



ROLAND ROTSAERT

La alia finaĵo de la Tuluzostrato: ruinigitaj domoj je la rando de la eŭropa kvartalo.

La urbo

Kvankam mi profesie laboras en Bruselo, mi nur malofte venas en ĝian eŭropan kvartalon. Origine ĝi estis burĝa kvartalo ekster la urbocentro, nove planita en la 19a jarcento, kun nomo „Leopold-kvartalo” (laŭ la unua belga reĝo), kun granda, samnoma parko. Jam de jardekoj ĝi aspektas al mi kiel ega, senfina konstruejo. Malnovajn kaj eĉ sufiĉe novajn konstruaĵojn oni detruas kaj anstataŭe venas grandaj konstruaĵoj. De la malnovaj stratoj restas nur kelkaj partoj, jen bone prizorgitaj, jen kun pereantaj domoj, kiuj atendas malkonstruiston. Trafa ekzemplo estas la Luksemburga Stacidomo, kiu iam estis la ĉefa internacia stacidomo de Bruselo. Ĝi ankoraŭ ekzistas, sed ĝi iĝis liliputa, kompare kun la novaj oficejoj ambaŭflanke kaj kun la Eŭropa Parlamento malantaŭ ĝi. De majo ĝis aŭgusto 2007 en tiu (nun eksa) stacidomo okazos ekspozicio pri la urboplanado en la eŭropa kvartalo (vidu www.brusselseurope2007.be).

La konferencejoj

En la invitletero estis klarigite, kie kaj kiam okazos la prelegoj kaj diskutoj. Tamen, la adresoj estis simpligitaj: mi ekzemple ne tuj sciis, kiel trovi „Charlemagne S3”. „K-Nal (Bassin Beco) (150)” estis eĉ pli mistera adreso. La dua adreso ŝajne estis apud kanalo, sed mi ne trovis



ĝin (kaj honeste dirite, mi ne vere serĉis, sed profitis de libera tago). Pli detale traserĉante la informojn, mi eksciis, ke *Charlemagne* troviĝas apud *Berlaymont*, la ĉefa domo de la Eŭropa Komisiono en Bruselo, kies situon mi konis. „S3” simple estas la numero de salono en ĝi.

La akcepto kaj la dungitoj

Forpasis la tempo, kiam eblis eniri iun ajn oficejon, saluti la homon ĉe la akceptejo kaj pluiri al la ĉambro, kie oni havas rendevuon. Ĉie nun necesas unue kontroli sakojn, malplenigi poŝojn kaj meti nomŝildon. Post tiu procedo abundas helpantoj, kiuj montras la vojon kaj disdonas dokumentojn. Menciindas la lingvouzo: la gardistoj ĉe la enirejo estas belgoj, kun kiuj oni povas paroli nederlande aŭ france; kun la helpantoj oni parolu france aŭ angle; kun la organizantoj de la aranĝo oni parolu prefere angle. Foje videblas purigisto aŭ teknikisto, sed tiuj plejofte klare ne estas eŭropevenaj kaj ne parolas.

La publiko

En *Charlemagne* mi nombris tri aŭ kvar kunvenejojn kun kapacito inter 100 kaj 500 personoj. Ili estis ĉiam preskaŭ plenaj. Apud la enirejo ĉiufoje estis disdonataj programoj kaj listo de partoprenantoj. El tiuj listoj evidentiĝis, ke proksimume duono venis el eksterlando kiel reprezentantoj de kompanioj kaj asocioj. Ankaŭ la „belgoj” fakte plejparte estis eksterlandanoj, ĉar temis pri (kelkaj) oficistoj de la eŭropaj instancoj kaj pri reprezentantoj de diversaj internaciaj asocioj kaj premgrupoj establitaj en Bruselo. Mi jam aŭdis, ke estas multaj lobiistoj en Bruselo, sed mi ne konsciis, ke ilia kvanto estas tiom granda. La divido viroj-virinoj en la publiko estis en ekvilibro, sed sur la podio virinoj maloftis.

La lingvoj

Ĉar la preparaj informoj estis nur anglalingvaj, ne estis surprizo, ke ankaŭ dum la prelegoj regas la angla. En la plej granda salono estis interpretado al la ĉefaj lingvoj. Ĝenerale la prelegantoj estis bone kompreneblaj, sed estis kelkaj personoj, kiuj parolis malbone komprene-

blan anglan kaj kiujn mi preferis aŭskulti pere de iu interpretisto. Kiam preleganto parolis angle, eble dekono metis la kapaŭskultilon; por francparolanto duono uzis ĝin kaj por pli ekzotikaj lingvoj kiel germana, itala aŭ hispana nur dekono ne bezonis interpretadon. La ne-angle-parolantoj estis politikistoj, kiuj raportis pri projektoj el sia regiono. Ŝajnas, ke la fakuloj bezonas kuraĝon kaj persistemon por *ne* paroladi angle.

Konkludo

La tuta semajno estis perfekte organizita; apenaŭ estis teknikaj problemoj. Por la partoprenantoj estis okazo por paroli kun samfakuloj kaj por revidi amikojn. Certe la interŝanĝo de ideoj utilis por pli bone kompreni la reciprokajn vidpunktojn. Por mi estis interesa sperto, sed post la semajno mi ne vere estas pli bone informita. Mi nun ja scias, ke la Eŭropa Komisiono multon entreprenas rilate al energio kaj medio, kaj ke estas plentempa okupo por sekvi ĉiujn projektojn. Dum la venontaj semajnoj mi pristudu la ricevitajn dokumentojn por iom plikleriĝi.

Roland ROTSZAERT

La iama luksemburga stacidomo, nun dominata de oficejoj de la Eŭropa Parlamento.



Impona popolfesto en Monso



Monso estas belega belga urbo, situanta inter Lille, en Francio, kaj Bruselo, en Belgio. En ĝi ĉiujare dum Trinitato (la dimanĉo post Pentekosto) okazas granda procesio enkadre de grandioza popolfesto. Kaj tio jam daŭras jarcentojn. La festo estas rekonata de Unesko kiel „ĉefverko de parola kaj nemateria komuna heredaĵo de la homaro” ekde la jaro 2005.

La procesio de la Ora Ĉaro

En la jaro 1349 pesto trafis la urbon Monso kaj ĝian regionon, kaŭzante grandajn malfeliĉojn. Por forigi tiun

plagon, monsanĉoj sin turnis al sankta Waudru, fondintino de la urbo. Ili decidis procesie promeni la korpajn postrestaĵojn de sankta Waudru, kiel ili jam faris antaŭe, sed ĉi-foje kun pli da pompo, kun pli da fervoro kaj pli da pastroj.

Okazis miraklo! La pesto malaperis kaj la dankemaj monsanĉoj ekde tiam organizas ĉiujaran procesion omaĝe al la sanktulino. La procesio ekas je la 9:30 horo kaj finiĝas tagmeze, kiam oni reveturigas la relikvuojn de la sanktulino en la preĝejon, nomatan honore al ŝi: Preĝejo sankta Waudru. Ĝi estas la



lingva parto de Belgio. La plej grava ero en ĝi estas, kiam la ora ĉaro revenas en la preĝejon de sankta Waudru. Tiam ĝi devas veturi sur kruta deklivo. Oni diras, ke se la ĉaro haltus sur la deklivo, tiukaze granda kaj grava sufero trafus Monson. Onidire en la jaroj 1914 kaj 1940 la ĉaro haltis! Ĉiujare centoj da monsanĝoj puŝas la ĉaron sub la brukriado de homamaso, por ke ĝi nepre atingu la preĝejon. Iufoje estas ankaŭ vunditoj.

Sankta Georgo kaj la drako

Tagmeze sur la granda placo okazas alia grava evento: la batalo inter sankta Georgo, kiu simbolas la bonon, kaj drako, kiu nomiĝas ĉi tie *El Doudou* (La Dudu) kaj simbolas la malbonon. Dum duonhoru, antaŭ la okuloj de miloj da spektantoj, ili interbatalas helpe de siaj kunuloj: barbaroj, diabloj kaj aliaj. Sankta Georgo bezonas sian sabron, poste sian lancon kaj finfine sian pafilon por venki la teruran beston. Kaj tiu granda venko estas aplaŭdata de ĝojega homamaso sub suna ĉielo, ĉar tiun tagon Dio mem estas monsanĝo!

La batalo estas tre, tre malnova, eble pli malnova ol la procesio de sankta Waudru. Sed la aktuala batalo devenas de du eroj: unue, de teatraĵoj, kiujn oni ludis ĉe la preĝejoj dum la mezepoko kaj kiuj prezentis la batalon inter Dio kaj Diablo; due, post la Krucmilito de Godfredo de Bouillon dum la 11a jarcento, oni terurigi en Monso, ĉar drako estis en la regiono kaj onidire manĝis homojn! Feliĉe kavaliro Gilles el Chin trovis la beston kaj mortigis ĝin. La okazaĵo enhavas parte histo-

rian fakton: eble krucmilitisto revenis ĉi tien kaj kunveturigis krokodilon el Nilo. Eble la besto fuĝis kaj manĝis homojn, kiuj konsideris ĝin drako ... Jen, el tiu du eroj monsanĝoj kunmetis la nunan ludon de drako kaj kavaliro.

Dum la batalo la sonoriloj de la monsa belfrido senĉese ludas arion de *El Doudou*, kiun neniuj forgesas, aŭdinte ĝin fojfoje. Plie, oni dancas kaj ridas, estas granda festo kaj ĉiuj amuziĝas. Dume homoj, kiuj staras proksime al la batalloko, provas eltiri harojn el la vosto de la monstro, ĉar onidire ĝia felo alportas feliĉon. La monstro, tiu bestaĉo, disdonas vostofrapojn al la amaso, ĉirkaŭanta la batalojn! Felon vi povos havi, se vi kun rideto kaj afableco petas pri tio iun, kiu sukcesis eltiri pecon el la draka vosto.

La batalo estas finita, post kiam sankta Georgo plene venkas. Tiam alvenas tempo por manĝi ion kaj poste daŭrigi la feston en la tuta urbo.

Unika etoso

Vi nepre venu al Monso almenaŭ unu fojon en via vivo dum Trinitato. La etoso tie estas unika, nekomparebla kaj la monsanĝoj fieras pri siaj bela urbo kaj folkloro! Ili ĝojegos, dividante kun vi sian feliĉon dum trinkado de bona belga biero!

Sed vi povas viziti la urbon ankaŭ en alia tempo: la urbo kaj ties muzeoj certe interesus vin! Bedaŭrinde, laŭ nia scio, ne estas Esperanto-broŝuro en la urbo. Do, eble vi parolas la francan aŭ la anglan. La turisma oficejo, kiu troviĝas sur la Granda Placo, disponigas broŝurojn en ambaŭ lingvoj.

Dominique VALLET

plej granda kaj plej bela el ĉiuj preĝejoj en Monso.

La relikvujojn, kiu enhavas la korpajn postrestaĵojn de sankta Waudru, oni metas komence de la procesio sur grandan ĉaron, faritan el orita ligno, eburo kaj veluro, kiun la monsanĝoj nomas „la ora ĉaro”. La ĉaro pezas ĉirkaŭ 1,2 tunojn kaj aĝas pli-malpli 250 jarojn. Ĝi estas tirata de ses fortaj ĉevaloj.

La procesio enhavas multajn religiajn kaj folklorajn grupojn kaj oni diras, ke ĝi fakte estas unu el la plej belaj kaj gravaj procesioj en la franc-

JEAN-POL GRANDMONT

Atentinda solvo por kompleksega problemo

De tempo al tempo, ie en la mondo, okazas granda simpozio de sciencistoj pri vivantaĵoj: bioloĝoj, botanikistoj, virologoj, bakterioloĝoj, paleontologoj ktp, por provi unuecigi siajn labormetodojn kaj interŝanĝi freŝdatajn informojn interesaj por ĉiuj. Ili ja komune pritraktas la „Arbon de la Vivo”. Konstanta plado de tiuj internaciaj kunvenoj, same kiel de apartfakaj interkonsiliĝoj, estas la scienca (t.e. greklatina) nomdonado al disbranĉiĝoj kaj specioj. Nun oni agnoskas la ekziston de jam kvin „regnoj”: *Monera*, *Protista*, *Fungi*, *Plantae*, *Animalia*. Do necesas kiom eble plej unuecigi.

Multaj laikoj, eĉ tiuj kiuj kutimas apliki la greklatinajn nomojn al bestoj aŭ plantoj, ŝatokupe aŭ profesie, pensas, ke tiu(j) nomenklatur(j) estas absolute ekzakta(j) kaj rigora(j), male al la bunteco kaj alegorieco de popu-

laraj nomoj (ekz. unu ĝenerala *nefor-gesumino* por triopa *Myosotis arvenis* / *sylvatica* / *palustris*). Jen granda eraro! Nuda kaj kruda fakto estas, ke abundegas eraroj kaj fuŝaĵoj en tiuj sciencaj nomoj, ne lastinstance ĉar koncernaj reguloj (multnombraj) kutimas kuntreni plurajn esceptojn, tiom ke preskaŭ neniuj kapablas ilin memori – nek emas tion fari.

Kaŭzoj por tiu priplorinda situacio estas pluraj: nesufiĉa regado de Latino kaj/aŭ la greka, malzorgo kaj indiferenteco de nomdonantoj, ofta bezono resituigi specion en alian branĉon, eternigitaj skriberaroj. Sed verŝajne la plej idiota kutimo kaj regulo estas tiu pri la „prioritato”: se oni hazarde malkovras en la arĥivoj nomon pli antikvan, ol tiu kiu ĝis nun estas uzata, tiu ĉi lasta devas malaperi kaj cedi lokon al la antikvulo, senrigarde, ĉu tiu estas

prave kaj ekzakte donita aŭ ne; plejofte ne. Oni ja tiomege ŝatas memorigi la posteularon pri sia granda malkovro kaj pri sia ekzisto en la mondo! La absurdeco, ja frenezo, tra la jarcentoj elkreskis ĝis tia proporcio, ke hodiaŭ ekzistas en Interreto aparta retloko, kiu kolektas la malraciaĵojn: home.earthlink.net/~misaak/taxonomy.html.¹

Tiun dornoplenan veprejon, kreskintan dum jarcentoj da kaprica evoluado, intencas draste kaj tutracie enordigi Nova Biologia Nomenklaturro, propagata de la samnoma Asocio fondita de d-ro W. M. A. De Smet. La sistemo rekonsideras ĉion ekde nulo. Nur la baza duelementa metodo, kiun la fama sveda natursciencisto Carl Linnæus iniciatis en la 18a jarcento, estas konservata: substantiva genronomo (kun majusklo) plus adjektiva karakterizo (sen majusklo). Esenca diferenco tamen: ambaŭ elementoj iĝas puraj Esperanto-vortoj, kio per unu bato forigas la bezonon konsideri la komplikitajn postulojn pri ortografio de la greka kaj latina lingvoj, ties norman prononcon, la signifon, same kiel la labirinton de tradiciaj nomenklaturaj reguloj, diferencajn eĉ en diferencaj fakoj.

La Asocio konsideras Genron samnivela kiel Familio kaj metode donas al ĉiuj membroj de Familio unu solan nomon, provizitan laŭnecese per koncerna karakterizo, kio forigas la bezonon memori kapricajn genronomojn tradicie senrilatajn al la centra nocio. Ekzemple la ŝlosila „Foko” havigas: **Fokoj** (por ĉiuj intimaj parencecoj), dum **Orelfokoj** kaj **Tuskofokoj** (por iom pli foraj parencecoj) anstataŭ *Phoca*, *Pusa*, *Hydrurga*, *Zalophus*, *Arctocephalus*, *Odobenus*. Do, ankaŭ plu neniuj bezonoj je la koncerna latina finaĵo *idae*. Pli simpla metodo apenaŭ imageblas, sen ke per tio la distingeblo inter la specioj perdiĝus; eĉ male: la drasta



MARCEL BURKHARD

*La drasta reorganizo permesas doni pli trafajn epitetojn por distingi inter la specioj: *Foko krudahara, kaspia, longkola*, anstataŭ vitulina, hispida, caspica, leptonyx ktp.*

reorganizo permesas doni pli trafikajn epitetojn por distingi inter la specioj: **Foko krudahara, kaspia, longkola**, anstataŭ *vitulina, hispida, caspica, leptonyx* ktp. Plie, NBN elektas la plej karakterizan por roli kiel tipan reprezentanton por la tuta grupo, kiu tial ricevas konsekvence la adjektivon „familitipa” **Foko familitipa**. La sama procedo estas senplie aplikebla al pli vastaj grupigoj (taksonoj) „ordo, klaso, filumo”, kiuj ricevas koncernajn epitetojn: *or-dotipa, klasotipa, filumtipa, regnotipa*. (Kiun planton vi elektus por reprezenti la tutan regnon de vegetaĵoj? Aŭ kiun beston por la regno de animaloj?) Tio avantaĝe forigas ĉiun cerbumadon pri la necesaj greklatinaj finaĵoj (*-idea, -inae, -ales, -formes?*). Simpleco kaj racleco ĉie, kaj aplikebla al ĉiu ajn regno!

Ankaŭ sur la malsupera nivelo de subspecioj, kiuj tradicie konsistas el tri vortoj, NBN enkondukas pli taŭgan adjektivon por la tria membro, pliparte precizeman geografian situigon: **Orelfoko familitipa japanmara** (*Zalophus californianus japonicus*). Notu, ke la tradicia nomo ĉi-okaze komplete kontraŭdiras sin, kio neniel estas escepto.

Krom tio, por faciligi retrovon de specionomo (aŭ taksononomo) en la longa listo – NBN jam determinis kaj baptis laŭ siaj rigoraj regularo kaj pripensado jam pli ol 3000 speciojn – la Asocio provizas novaspecan litercifiran metodon aldonan, imite al identigaj verkoj pri plantoj aŭ bestoj, kiuj donas unupartite alfabetan nombroliston, aliparte provizante ĉiun bildon per referenca numero.

La libro citas multnombrajn ekzemplojn, tiom pri la absurdeco de Tradicio, kiom pri la avantaĝoj de la nova sistemo, kaj ĝi traktas nombron da detalaj problem(et)oj. La protokolamo de la aŭtoro tamen instigis lin, ne nur skizi estiĝon kaj disvolviĝon de NBN, sed ankaŭ kiu lanĉis kiun dekretan (regulon), kiam kaj pro kio. Ĉu tio vere necesis? Iom pezas ankaŭ la stilo en ambaŭ versioj (la angla cetere suferas pro artefariteco), sed estas ja teknika pritrakto, ne romano. Oni ricevas la impreson, ke la verko restis en kruda

stato kaj ne ricevis atentan postkontrolo.

Ŝajnas, ke la sorto de NBN estas tiel intime ligita al la sorto de Esperanto mem, ke venko de l’ unu dependos de la venko de l’ alia. Ĉiel ajn, la tasko kiu atendas la asocion estas giganta; sendube tro vasta por nur malgranda skipo da fakuloj. Tri mil terminoj estas jam admirinda atingaĵo, certe, sed nur guteto kompare al la oceano de milionoj da kandidatoj, kiuj atendas enordigon, se konsideri ĉiujn regnojn kune, plus fosiliojn. Tial tasko por iu kompleta instituto pri nomenklaturado, kvankam ni ne neglektu, ke ankaŭ necesos sufiĉa unuanimeco – ja postulis 35 jarojn antaŭ ol la tradicia Komisiono pri Zoo-

logio sukcesis atingi interkonsenton pri definitiva nomo por la ĉimpanzo!

Entute: vere atentinda solvo por kompleksa kaj multifaceta problemo, interesa ne nur por biologoj en vasta senco, sed ankaŭ por aliaj fakuloj, kiuj luktas kun nomenklaturaj demandoj.

Manuel HALVELIK

1. Tiele la simpozianoj bedaŭrindege sukcesas nur „kuraci la simptomojn” sen reale ataki la nomenklaturan malsanon je la radikoj.

W. M. A. De Smet: *Analizo de Nova Biologia Nomenklaturado / An Analysis of New Biological Nomenclature*. Eld. SAIS Nitra 2005. 262 paĝoj glue binditaj. ISBN 80-967425-7-4.

Robota mano – regata de pensoj

Japanaj sciencistoj, estrataj de Yukiyasu Kamitani de la *ATR Computational Neuroscience Laboratories* en Kioto, prezentis robotan manon tute regatan de la pensoj de la uzanto. Tiu mano imitas la movadon de la natura mano pere de realtempa analizo de la cerba aktiveco. Partoprenantoj en eksperimento, kuŝantaj en cerba skanilo, estis petitaj fari „ŝtonan, paperan kaj tondilan figuron” per la dekstra mano. La skanilo registris la respondan cerban aktivecon, mezurante la sangon fluon en la cerbo. La informoj estas plusendataj al komputilo, kiu regas la robotan manon. Post mallonga trejnado la komputilo povas asocii la cerbajn sinsekvojn kun la faritaj figuroj. Kiam la persono faras pugnon („ŝtono”), la komputilo instrukas la robotan manon fari same, uzante nur la cerban signalon. Kvankam la metodo funkcias malrapide kaj estas multekosta, ĝi reprezentas gravan mejloŝtonon en la konstruado de protezoj kaj komputiloj tute regataj de la pensoj de la uzantoj.



Ankaŭ germana teamo de la *Fraunhofer Institut für Rechnerarchitektur und Softwaretechnik* konstruis homan-komputilan interfacon. Dum la lasta CeBIT (elektronika foiro en Hanovro) ili prezentis sian „mensan tajpilon”. Tiu instrumento mezuras la elektran cerban aktivecon, la elektroencefalograman signalon, tiel regante la movon de kursoro sur ekrano. Uzanto, portante kufon kun elektrodoj, imagas la movon de sia mano por elekti la deziratajn literojn per la kursoro. Gabriel Curio de la malsanulejo *Charité* diris, ke uzantoj povas uzi la instrumenton post nur 20 minutoj da trejnado. Ankaŭ tiu tekniko utiligas programaron kun artefarita intelekto. La sciencistoj nun intencas konstrui komercan version de sia „tajpilo” por helpi amputitojn kaj paralizitojn.

Oliver KIM

MEDICINO

Genetika analizo konfirmas la originon de HIV-1




PIERRE CLAVEIROLE

Internacia teamo de sciencistoj konfirmis, ke la homa HIV-1-viruso, la kaŭzo de aidoso, devenas el la similspeca SIVcpz-a viruso de ĉimpanzoj. Kvankam tiu fakto jam longe estis supozata, solidaj pruvoj mankis, ĉar nur malmultaj kaptitaj ĉimpanzoj fakte portis SIVcpz. Pro tiu kaŭzo, ĝis nun multaj personoj dubis, ke ĉimpanzoj povas esti la natura rezervujo de la viruso. La teamo analizis ĉimpanzajn fekaĵojn, kolektitajn el solecaj regionoj de la arbaro de Kameruno, pri la ĉeesto de virusa heredeca substanco (la RNA) kaj antikorpoj kontraŭ la viruso. Tiuj antikorpoj estis produktitaj kiel reago de la ĉimpanza imuna sistemo kontraŭ la viruso. La analizo montris,

La homa HIV-1-viruso, la kaŭzo de aidoso, devenas el la similspeca SIVcpz-a viruso de ĉimpanzoj.

Tri-dimensia figuraĵo de HIV



WIKIMEDIA COMMONS

ke ĝis 35 % de la sovaĝaj ĉimpanzoj el kelkaj grupoj portas SIVcpz-n.

La teamo izolis la virusan RNA-n el la fekaĵo por sekvaj esploroj. Tiel ili kondukis la unuan molekulan epidemian esploron de SIVcpz, ebligante la komparadon de la homa HIV-1 kun la simia viruso. Laŭ Brandon Keele, la ĉefaŭtoro de la raporto, „la malkovro de tiu nature infektita ĉimpanza grupo ebligas la eksplikon de la natura historio kaj de la konduto de SIVcpz en la naturo kaj helpas nin malkovri kial kaj kiam SIVcpz transpasis la ĉimpanzan-homan limon.” La esploro, realigita de sciencistoj ĉe la usona universitato de Alabamo en Birmingamo, estos publikigita en sekva numero de la ĵurnalo *Science* (Scienco).

Oliver Kim



JACI GRESHAM

La usona universitato de Alabamo en Birmingamo.

Mi estas homo

Eble pro la centjariĝo de la interna ideo aŭ pro la 120a datreveno de la lingvo mem, eble pro la 90-jara memorigo de la morto de Zamenhof aŭ eĉ antaŭvide al la 150-jara jubileo de lia naskiĝo, la intereso pri la konceptoj de „la Majstro”, ne nur lingvaj sed ankaŭ filozofiaj kaj etikaj, plu kaj plu kreskas. En 2003 aperis en Toruń, ĉe Esperanto-societo FLAMO *Kongresaj paroladoj de L. L. Zamenhof kiel manifesto de esperantismo* de Jitka Skalická; en majo 2006 aperis ĉe Krakova Societo Esperanto *Esperanta verkaro de fratoj Zamenhof* de Marian Kostecki; en la itala ĵus aperis kolekto de tekstoj pri interlingvoj, kun aparta rigardo al Esperanto, fare de Paolo Valori.

Kvankam eble neniuj esperanta tekstaro estis tiom studita kaj eldonita kiom la zamenhofa, tamen mankis sinteza kolekto de liaj multaj tekstoj ankaŭ alilingvaj, disdate kaj disloke aperintaj inter diversaj ruslingvaj kaj judlingvaj gazetoj, plus unu intervjuo anglalingva. „Kanonaj libroj” oni nomas tiujn, kiuj formas la bazon, laŭ kiu oni ĝuste analizu iun doktrinon: nepre necesu koni tiujn, kaj koni tiujn plene sufiĉu.

Konsultado de fakuloj

Nu, la nun recenzata verko de Aleksander Korĵenkov, aperinta en Kaliningrado kiel n-ro 6 de la serio *Scio*, difinas tiun kanonon por la zamenhofa filozofio. Ĉar ĉiu ajn decido pri tio, kio estas baza kaj kio akcesora, kuntrenas certan marĝenon de subjektiveco, la aŭtoro ne agis laŭ propra arbitro, sed konsultis diversajn fakulojn, de Blanke al Lins, de Sikosek (nun van Dijk) al Künzli. La tekstoj, kiujn li esploris, estis jam publikigitaj, sed, ekzemple, tiuj tradukitaj el la rusa (ĉefe de Holzhaus) prezentis makulojn; Korĵenkov tre skrupule retradukis aŭ, minimume, ĝustigis, tiel ke la kolekton eblas rigardi ankaŭ kiel enhavantan originalaĵojn.

La rezulto de ĉi tiu granda kaj tempokupa laboro pentras la figuron de la iniciatinto de Esperanto en sia pleneeco, multe pli amplekse ol ĝi estas kutime konata ĉe esperantistoj. La ideo de komuna lingvo sukcesis, eĉ se nur etparte, ĉar ĝi estis facile komprenebla kaj alprenebla: ĉiuj uzu saman lingvon por interkomuniki inter malsamlingvanoj. Finfine tio estis ne malkutima situacio ĉe diverslingvaj civitanoj de unu ŝtato, regata de unu etno: la lingvo de la regantoj iĝis la lingvo de la tutŝtata komunikado. Alpreni do ununuran lingvon kiel komunikilon ŝajnis oportune al multaj; ke tiu lingvo estas art(efarit)a, gardis egalrajtecon por ĉiuj: neniuj rezignis sian lingvon, neniuj la sian trudis.

Kontraŭdiraj konceptoj

Sed la lingva aspekto estis nur parto de multe pli ampleksa mondrigardo kaj ege pli ambicia celo de Zamenhof: krei homon, kiu, rezignante nek je sia lingvo, nek je sia kulturo, nek, precipe, je sia religio, sentu sin egala al la aliaj homoj, estu al ĉiuj respektama kaj de ĉiuj respektata. Ĉi tiu celo ne estis matura en la tempoj de Zamenhof, kaj ankoraŭ ne estas matura hodiaŭ: religio mem postulas, minimume, kredon je iu *potenca senkorpa mistero, fortego, la mondon reganta*, kaj la koncepto de religio „neŭtrale homa”, kun „neŭtrale homaj temploj” estas parte kontraŭdira en si mem.

Esti edukata en iu religio ne estis, nek nun estas, konsiderata iu historia hazardo, samkiel la naskiĝo en unu aŭ alia loko, aŭ en unu aŭ alia lingva medio, sed ĝi kuntrenas senton de supereco, de „pravo” en la komparo kun alikredanoj. Religio oni konscie akceptas je aĝo de memstara pensokapablo; transiro de unu religio al alia estas konsiderata apostateco, dum transpaso al alia lingvo estas fenomeno sentata kiel multe pli normala kaj entute ne aparte kondamninda (tiel

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serie Scio, Volumo 6

ke ne ekzistas specifa termino por tio). La koncepto de „elektita popolo”, kiun hebreoj havis kaj poste transdonis al kristanoj, ne estas akordigebla kun sento de egaleco sur la religia tereno; la koncepto de „revelacio” evidentiĝita al unu popolo sed ne al la aliaj, aŭ la koncepto pri gojo konfliktas kun egaleco. Tial la koncepto de „neŭtrala religio” povas pluvivi nur ĉe kompleta abolicio de la kredo entute.

Neŭtrale homa

Sed Zamenhof kontraŭis tion, ĉar laŭ li la eksteraj formoj de la religio, festoj, ceremonioj, ritoj estas aferoj ne-rezigneblaj sen granda spirita kaj socia malgajno. Li firme kredis kaj asertis, ke sen religio homo ne povas havi riĉan spiritan vivon, kaj ke senreligiuloj, originantaj el kredoj diversaj, eĉ post la forlaso de siaj respektivaj kredoj restos fremdaj, same kiel diverskredaj religiaj. Tamen ne eblas spuri konvinkan racian pravigon de tia ripetita aserto. Se preni nur simptomon, la traduko mem al naciaj lingvoj de la esprimo „neŭtrale homa”, „homarano”, „homaranismo” kaŭzis plurajn malfacilaĵojn, ĝuste ĉar la zamenhofa koncepto estas fremda al la ordinara homa menso, kaj la etnaj lingvoj ne produktis specifan terminon por tiu koncepto.

Zamenhof estis homo ekstreme aŭdaca kaj ekstreme timema samtem-

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

►pe. Li ekpaŝis per tre avangardaj ideoj kompare kun sia tempo, sed sen la kuraĝo ilin subskribi propranome. Li timis, ke pro la sameco de la proponinto la kontraŭeco kaŭzota de avangarda ideo, kiel homaranismo, endanĝerigos la stabilecon de ideo jam pli facile akceptebla kaj eĉ preskaŭ larĝpublike akceptita, kiel internacia lingvo. La broŝuro, eldonita ruse en 1901, estis pseŭdonime subskribita *Homo sum*. En ĝi „hilelismo” estas difinita kiel nova religia partio en la sino de la jam ekzistanta hebrea religio, do temis pri la sama hebrea Mose-devena religio, senigita de flankaj „almiksaĵoj”. La tuta esenco de la zamenhofa projekto estis purigi la hebrean religion el ĉio kaŭzanta malhelpon, krei por la hebreoj propran lingvon, trovi por la hebreoj difinitan lokon.

Sed la ideo evoluis, kaj en januaro 1906 la dogmoj de hilelismo, intencita por la hebrea diasporo, estis etenditaj al la tuta homaro: la nova nomo *homaranismo* aperas en broŝuro anonima (!) en marto 1906. Kio estis okazinta intertempe? Ja, la fenomeno „Bulonjo”. La unua UK montris, ke la lingvo funkcias, kaj ke la adeptoj, kiuj povas prikonsenti universalan ideon ne nur pri lingvo sed ankaŭ pri homeco, estas ja ankoraŭ minoritato, sed minoritato ne tro malgranda. La tiom timitaj versoj *Al Vi, ho potenca senkorpa mistero [...] Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali / por reunuiĝi l' homaron. / Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali / [...] La Forto mistera de l' mondo nin benos* estis vekintaj grandan aplaŭdon. Kiel Zamenhof mem diras en nefermita letero al Beaufront, aperinta en *Ruslanda Esperantisto*, la impresoj de la Bulonja kongreso rapidigis la decidon publikigi la *Deklaracion pri Homaranismo*; kaj tiuj impresoj donis al Zamenhof la kuraĝon elpaŝi per la dua parolado en Ĝenevo pri la interna ideo kaj la tria pri la celo de la Esperanto-kongresoj, kiujn li intencis kiel kongresojn de la homaranaj ideoj.

Kion Zamenhof rifuzis el la siatempa socio, kaj kion li ne kapablis rifuzi? Li rifuzis, intime, la ideon de imperio, kiu egaligas ĉiujn per subpremado; sed li ne kapablis rifuzi la ideon de ŝtato, unu ŝtato por ĉiu popolo. Zamenhof revis

pri (ĉu ebla?) demokrata ŝtata strukturo, do tute disigante sin de Marx kaj de Bakunin. Usono povis esti unuapense modelo por la socio de li revata, sed la rezulto de judaj grupoj, migrintaj en Usonon, ne estis konservado de la propraj specifecoj, sed ja asimilado, kaj tion Zamenhof malkonsentis. La judoj, kiuj iris en Usonon, ne sukcesis konstrui tie judan ŝtaton, sed nur juddevenan minoritaton, rigardatan tiom suspektome, kiom ĝi celas resti aparta. Zamenhof revis pri 60.000-membra juda komunumo en Usono, kiu poste povu, laŭ la Usona konstitucio, peti agnoskon kiel memstara federacia ŝtato. En sia cionisma epoko li favoris unuatempe tiun translokiĝon de judoj al Usono, sed poste transiris inter la favorantojn de juda ŝtato en Palestino.

Laŭetna ŝtato kaj religio

Sed du tute gravajn ideojn Zamenhof ne kapablis rifuzi. La ideon de laŭetna ŝtato kaj tiun de religio. Etnan ŝtaton li vidis kiel solvon de la problemoj de la unuopaj popoloj, precipe klasataj laŭ la lingvoj: sociajn tavolojn li preskaŭ neglektis aŭ eĉ preskaŭ ne rimarkis. En tre atentinda recenzo de la nuna verko, aperinta en *La Ondo de Esperanto*, n. 10, 2006, Walter Ŝelazny rilatigas la zamenhofan vidpunkton pri ŝtat-etiko al la francerevolucia slogano „libereco, egaleco, frateco”. Sed la recenzinto refutas, ke tiu revolucio vere celis egalecon: ĝi fortranĉis tutan aron da nefrance parolantaj minoritatoj. La „egaleco” estis nur por francelingvaj francoj. Efektive, Zamenhof ne kapablis liberiĝi el la ideo de etna ŝtato, kie etnoj estas konturitaj laŭ la lingvoj.

Aliflanke, la religio li vidis kiel solvon de la animaj problemoj de la individuo, tamen ne en persona dimensio, sed en tutsocia. Iu vere neŭtrale-homa religio (tamen ĉiukaze strikte mono-teisma), kun siaj neŭtrale-homaj ritoj kaj festoj, estas la antaŭĉambro de ateismo, sed trans tiun antaŭĉambron Zamenhof ne sukcesis plui.

La evoluo de la zamenhofa pensado

La 77 tekstoj, kunigitaj en la verko, laŭas diakrone la vojon de la evoluo

de la penso de Zamenhof dum la jardekoj, ekde lia partopreno en la cionisma movado ĝis la homaranisma revo. Diakronismo tute oportunas, ĉar, ekzemple, la *Plena Verkaro*, redaktita de Dietterle, grupigas la zamenhofajn verkojn laŭ kategorioj (antaŭparoloj, gazetartikoloj, paroladoj, traktaĵoj, leteroj) kaj nur la esperantaj originalojn, tiel ke la rekonstruo de la pensevoluo estas malfacila. La unua peco de la nuna kolekto estas longa artikolo, poparte aperinta en rusa gazeto dum pluraj numeroj de 1882, pri tio, kiel estu solvita la „hebrea demando”, t. e. la trovo de loko, kie hebreoj povu vivi ne estante persekutataj. Ni rimarku la daton: 1882, do multe pli frue ol Zamenhof ekpaŝis per Esperanto, sed multe pli malfrue ol li ekpensis pri internacia lingvo. Tian internacian lingvon li konceptis por forigo de la *malamikete de las nacjes*, sed li konceptis ĝian aplikon tutunue al la diaspora hebrea popolo. La lasta peco estas fragmentoj pri Dio kaj senmorteco, trovitaj sur la skribotablo de Zamenhof ĉe lia morto, kiel atestite de Privat.

Oni preskaŭ ne trovos en la libro Esperanton, sed Zamenhofon kiel homon. Malgraŭ la rigora selekto, kelkio estas ripetita: Zamenhof ne estis konciza, li iel predikis kvazaŭ el pupitro, per ekzemploj, enŝovante hipotezajn kontraŭajn opiniojn de hipotezita aŭskultanto kaj refutante ilin.

Multo estus ankoraŭ pritraktinda kaj komentariinda, sed recenzo ne iĝu eseo. Ni nur konklude diru, ke en la rondon de la zamenhofologoj Aleksander Korĵenkov enpaŝas aŭtoritate per ĉi tiu saĝe kompilita kolekto de zamenhofaj tekstoj: verko absolute rekomendinda, legebla, danke al la bela stilo de Zamenhof, kun intereso preskaŭ de spur-avida detektivo, kaj facile komprenebla danke al ampleksa notaro kompetente kunmetita.

Carlo MINNAJA

Aleksander Korĵenkov: *Mi estas homo – originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof*. Eld. Sezonoj, 2006, 288 broŝuritaj paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 24,00 eŭroj + aŭfranko.=


Kio estas sklavo kaj kiu estis Kristo

Arne la ĉefido estas eta libro de iom pli ol cent paĝoj pri la dekjara knabo Arne. La rakonto okazas dum la periodo de la vikingoj. Arne estas la filo de la ĉefo Björn. Ili loĝas en malgranda vilaĝo en Svedio ĉe golfeto, kie vivas liberaj homoj kun siaj sklavoj.

Arne lernis de sia patro, ke sklavoj devas labori kaj ke li ne rajtas ludi kun la sklavidoj. Li kutimis ludi kun Trumbe, sklavido, kiu estis samaĝa kiel li. Li obeas sian patron, sed ne bone komprenas, kial li ne rajtas amuziĝi kun Trumbe. Kiam li ekscias, ke ankaŭ liberaj homoj povas estiĝi sklavoj, li komencas pripensi, kiel estas ilia vivo. Lia amiko Gunnar, unu el la liberaj infanoj, tute ne okupiĝas pri tiaj aferoj.

Ankaŭ Kristo estas io, pri kio Arne multe pensas kaj demandas. Li rimarkas, ke multaj sklavoj kaj la fremduloj faras krucsignon sur la frunto, kaj li volas scii kial. Ĉi tiuj gravaj kaj seriozaj temoj estas miksitaj kun pli streĉaj partoj – ĉasado de alkoj, alveno de fremduloj, fuĝo pro piratoj ktp – tiel ke la rakonto certe neniam enuigas dum la legado.

La libreto taŭgas por sufiĉe junaj infanoj por laŭtlegi kaj por iom pli aĝaj, kiuj jam bone memstare legas. Kio estas sklavo kaj kiu estis Kristo estas bone klarigitaj, tiel ke ĉiu infano facile povas sekvi, pri kio temas. Ankaŭ la resto de la rakonto estas facile sekvebla kaj bone ellaborita,



kaj la tuto estas bele verkita en facila lingvo.

La libro estas presita en malgranda formato kaj enhavas kelkajn nigra-blankajn, simple desegnitajn bildojn de Pavel Rak. Mi rekomendus al ĉiuj gepatroj aĉeti ĉi tiun libron por siaj infanoj, ĉar ĝi vere indas kaj estas tre amuza por legi.

Karlijn VAN DAMME

Leif Nordenstorm: *Arne, la ĉefido*. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2006. Ilustris: Pavel Rak. 112 paĝoj glubinditaj. ISBN 80-85853-77-9.

Prezo ĉe FEL: 5,50 EUR + aŭfranko.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.

Konata voĉo ree sonas



La voĉo de Ivo Lapenna estis konata al generacioj de esperantistoj. Lia oratorado vibrigis, entuziasmigis, emociis, plurfoje profunde kortuŝis milojn da homoj. Sed li ĉesis oficiale paroli en 1987, nur malmultajn semajnojn antaŭ sia morto: pasis do jam dudek jaroj, kaj la personoj, kiuj havas memoron pri la vervo de lia voĉo, iom post iom estingiĝas. Generacioj sekvas unu la alian, kaj memoroj perdiĝas.

Ivo Lapenna postlasis en ĉiuspecaj revuoj centojn kaj centojn da gravaj artikoloj: la movado trapasis liajn pensojn, kaj ĉio movada estis de li analizata kaj interpretata. Revuoj kaj paroladoj estis liaj periloj al la internacilingva publiko, publiko, kiu rapide konsumas sensaciojn kaj emociojn, sed ne havas tempon aŭ emon legi plenan libron. Tial libroj de li verkitaj, kolektantaj lian oratorecon, estis principe nur du, kvankam fundamentaj: *Retoriko* kaj *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*.

Cetere, la oratora flanko tute fadas en skribita paĝo. Tial la eldono de

por estonteco.

La freŝe eldonitaj tri diskoj entenas ses prelegojn de aliaj tempoj, el kiuj kvar estas de la kvindekaj jaroj: alia elano, aliaj proponoj, eble aliaj esperoj. En du el tiuj paroladoj oni perceptas la sintenon de Lapenna kontraŭ la tiama UEA: estis fendo, estigita de la estraraj kaj komitatataj elektoj en Hamburgo en 1974, kiuj kaŭzis la foriron de Lapenna de UEA kaj la aranĝon de la konferencoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM) kaj poste de la Internacia Centro de NEM. Pasis pli ol 30 jaroj, kaj pri ĝi historiistoj eventuale plu diskutos, analizos kaj definitive verdiktos. Sed ankoraŭ interesa laŭ la historia vidpunkto estas la pozicio de Lapenna, esprimita en prelego, enkondukanata al la laborprogramo por la centjara jubileo de Esperanto en 1987, laborprogramo, lanĉita de Lapenna jam en 1981.

La plej interesa dokumento estas, tamen, la registraĵo de la plej glora evento de la Lapenna-periodo, la sesio de la Ĝenerala Konferenco de

Unesko en Montevideo, de la 10a de decembro 1954. Mallonga klarigo de la antaŭaj faktoj antaŭas la registraĵon, en kiu aŭdiĝas la prezento de la fama mocio, kiu legeblas en ĉiu jara eldono de la UEA-jarlibro, kaj kiu agnoskas la rezultojn, atingitajn per Esperanto en la kampo de kulturo. La meksika delegacio prezentas (hispane), la svisa delegito apogas franclingve, dirante, ke la antaŭa voĉdono el la programkomisiono maturiĝis en nefavora situacio, la brita delegito proponas amendon (angle), la prezidanto voĉdonigas kaj la rezulto estas 30 por, 5 kontraŭ kaj 17 sindetenoj. La verva aplaŭdo kuntenas ankaŭ la nunan aŭskultanton.

Jes ja, Montevideo estis la plej alta pinto de la sukcesoj de Lapenna, almenaŭ la plej videbla, tiu, kiu donis la plejajn eblojn por ŝtata instruado. Pri ĝi Lapenna verkis multloke, interalie, en *Esperanto en perspektivo* kaj en la revuo *Horizonto*. Tiujn emociajn tagojn mi havis la okazon siatempe travivi kun granda partopreno: mia karmemora Patro, tiam redaktoro de *Radio Roma*, estis inter tiu ducento da aktivuloj, kiuj ricevis broŝuron kun eltiraĵoj el la leteroj de Lapenna al la CO de UEA. Plena raporto, kun ĉiuj dokumentoj, aperis neniam, sed elĉerpa estas la artikolo, aperinta en la verko *Eseoj memore al Ivo Lapenna* sub la titolo *Pasio, racio kaj emocio: de Parizo al Montevideo*.

Aliaj paroladoj estas same emociantaj. La kultura valoro de la internacia lingvo estas la temo de la festparolado en 1954 en Harlemono: principoj ĉiam validaj, bone enkadrigitaj per preciza oratora skemo. La aparteno al la gento kaj al la lingvo estas supera al la aparteno al la nacio, kaj la aparteno al la homaro manifestiĝas per la uzado kaj disvastigo de la internacia lingvo. Dek jarojn poste, denove en Nederlando, en Hago, la kongreso ĝuis la altan protektadon de nederlanda reĝino, kaj Ivo Lapenna salutis la reprezentantojn de la registaroj, ĉeestantaj la

inaŭguron. Kiel domaĝa diferenco de la nuna situacio, kiam reprezentantoj de registaroj kaj ambasadoroj apenaŭ sendas salutmesaĝon al niaj UKoj! La skemo de la paroladoj de Lapenna, precipe la festparoladoj, estis ĉiam la sama: saluto al la oficialaj partoprenantoj, memorigo pri la ĉefaj personoj de la gastiganta lando, paraleligo de la ideoj de tiuj granduloj kaj la ideoj, disvastigataj de esperantismo, kerna tuŝo de la kongresa temo: jen la internacia kunlaboro, jen la homaj rajtoj, jen la internacia jaro de edukado.

Malgraŭ la evoluo de la lingvo, kaj ankaŭ de la oratora stilo, nature okazintaj dum la jardekoj, la voĉo, la gramatiko, la stilo de Ivo Lapenna estas plu modelaj; la vortoj de la akompana folio, kiu deklaras la diskojn „stile kaj enhave la plej bona kaj instrua modelo kaj por la nuna kaj por la estontaj generacioj”, estas ankoraŭ nun konsenteblaj. Lapenna konis sian publikon: ĝi estis la meza kongresanta esperantisto, bona aŭskultanto de la lingvo, sed neŝatanto de strangaj novismoj; facile entuziasmiĝanta ĉe la agnosko de la propraj ideoj, tiel brile kaj precize prezentataj, facile trenebla al fraz-postfrazo aplaŭdo. Liaj paroladoj estas korvarmigaj, laborinstigaj, lingve plaĉaj, tiel ke ordinara aŭskultanto sendube miris, vidante siajn proprajn ideojn esprimataj tiel simple kaj tiel bone.

Absolute altranga estas la kvalito de la surdiskigo: bruoj, akutoj kaj akustikaj difektoj, neeviteblaj dum rekta registrado, estas complete forigitaj, tiel ke la elparolo estas vere modele aŭskultebla; kaj tamen la aplaŭdoj plu donas la impreson senpere aŭskulti en la kongresa halo. Por la grupoj kaj kursoj, kiuj ne havas grandan eblecon aŭskulti aliajn personojn, krom la lokan estron aŭ la kursgvidanton, jen ege rekomendinda helpilo por la prononco kaj stilo entute.

Carlo MINNAJA

Ivo Lapenna: *Du paroladoj*. Eld. Fondaĵo Ivo Lapenna, Kopenhago, 2003, 2006. Kvin kompaktaĵoj (kun po du paroladoj).

Prezo ĉe FEL: po 12 EUR + afranko.

Knabinoj, cignoj, burĝonoj

Jen kompakta disko, kiu prezentas 16 kantojn, ĉiuj krom unu novaj. Krom la titolaĵoj: amantiĝoj, printempo, Parizo – jen komencaj kaj trakuraj temoj de la kolekto. Kiel kutime, Bronŝtejn mem aŭtoris la tekstojn kaj melodiojn. Enkonduke li pledas, ke oni atentu la tekstojn kaj iliajn aludojn. Feliĉe tio facilas, ĉar la kantado estas klara kun bonkvalita registrado, en prizorgo de Lev Rumjancev. Krome estas aldonitaj ĉiuj tekstoj en alloga kolore presita 16-paĝa libreto. Por aldoni varion al la aŭskultado, kunlaboris profesiaj kantistinoj Tatjana Belova, Vera Vlasova kaj Evelina Sokolova, kies fotojn vi vidas fine de la libreto. Por la kantoj gitaro estas la baza instrumento, sed suplemente sonas pluraj pliaj.

Eroj 8-14 formas kompletan omaĝon al la 200-jariĝo de la eminenta poeto Aleksandr Puŝkin. En la unua kanto el tiuj la aŭtoro mem omaĝas; sekvas iom ŝercaj kontribuoj de delegitoj diverslandaj: brita, pola, franca, sveda kaj ĉina. Ili aludas iujn okazaĵojn aŭ sintenojn de siaj landanoj al la omaĝato. La brito komparas lin kun Byron, la polo kun Mickiewicz; la franco montriĝas la pranepo de tiu, kiu duele mortpafis la poeton en 1837. Fremdlingvaj esprimoj kaj historiaj aludoj ricevas klariĝon en la libreto.

Enhavaj okulfrapas, almenaŭ al mi, versparo de *Adiaŭ Paris!*:

... en la koro restas nun
cikatro inter sen kaj kun ...

La lasta kanto *Por Ĵomart* reprenas la sezonan fadenon de la unua kaj la kor-centrecon de la ĵusa cito. Du eltiraĵoj:

... en koroj apenaŭ aŭtunas
la fajre junula amem' ...



... *retrilos printempo ekverde
en nia amika ĝarden' ...*

Por tiu, kiu konas kaj aprezas la kantojn de Mikaelo, jen inda aldono al via disko-kolekto.

Stefan MACGILL

Mikaelo Bronŝtejn: *Printempo blujnsa*. Kompakta disko kun 16 kantoj. Eld. la aŭtoro, Tifvin (Rusio), 2006. Ludodaŭro: 50 minutoj.

Prezo ĉe FEL: 18,80 eŭroj.

Busvojaĝo

Eble mi bonŝancis: la buso estis preskaŭ plena, sed loko apud mi liberis. Se konsideri, ke en la vojo mi devos pasigi pli ol 9 horojn (plejparte nokte), tio donis al mi ian avantaĝon. Mi povis simple ripozi dum la tuta vojo duonkuŝante, ne aŭskultante la kutime tedajn najbarojn, kiuj dum similaj longdistancaj vojaĝoj ŝatas rakontadi iajn siajn eventojn, okazintaĵojn aŭ simple babilu.

La komencaj kilometroj de la vojo, kiam la buso veturis tra la urbaj stratoj, estis ne interesaj, des pli, ke la buso veturis tra la urbo ege malrapide. Kvankam la urbo ne estis malgranda, ĝiaj stratoj estis relative mallarĝaj kaj ne povis tralasi amason da urbtrafikaj malmmodernaj aŭtobusoj *Ikarus*, produktitaj en Hungario, aŭ tiuj de la bus-uzino el Lviv *Laz*; same malnovaj tramoj, produktitaj en la fama ĉeĥa uzino Škoda. Kaj tiuj kaj la aliaj jam delonge atendis sian emeritecon, ĉiuj eblaj iliaj resursoj estis jam delonge foruzitaj. Malhelpis al libera veturado de nia buso ankaŭ amaso da modernaj aŭtomobiloj, plejparte venigitaj el eksterlando.

Mi enbusiĝis kaj komencis rememoradi la lastan periodon de mia vivo. Oni diras, ke la unuan parton de la vojo homo kutime pensas pri la lasita hejmo kaj hejmanoj, sed la duan jam pri tio, kio al li devos okazi en la nova loko, kien li veturas. Eble oni pravas.

Mi sidis apud fenestro kaj dume senpense, aŭ preskaŭ senpense, rigardis tra ĝi. Jen ni traveturis la centran placon, kien unuperiode mi ŝatis venadi por simple spiri la etoson de malnova urboparto, denove kaj denove rigardi malnovajn konstruaĵojn. Laŭnordire en diversaj landoj la centra placo de ĉefurbo estas la plej vidinda loko kaj kutime tre ĉarma. Mi estis en kelkaj eŭropaj ĉefurboj kaj havas eblecon kompari. Vere ankaŭ nia ĉefplaco

estas vidinda: la domo de la urbestro, bele farbita kaj ĉarme lumigita vespere, palaco de la Justico, multnombraj privataj butikoj, vendantaj kaj diversspecajn bierojn kaj manĝetaĵojn kaj memoraĵojn, sen kiuj ne ekzistas ajna urbo, ajna ŝtato.

Nia urbo etendiĝis laŭlonge de loka rivero. La nuna urbestro estas nemalbona mastro, vere zorganta pri la urbo; pro tio ĝi poiomete komencis aspekti pli kaj pli bone: la vojoj estis jam relative bone asfaltitaj sen la senĉesaj kavoj kaj malglataĵoj ordinare kutimaj en nia lando, apud loĝdomoj aperis lokoj por ripozo, benkoj, kie povis sidi kaj emeritoj, atendantaj siajn nepojn, kaj mezaĝuloj, legantaj freŝajn periodaĵojn. Obliĝis ankaŭ florejoj, kies multkolorco ĝojigis la okulojn.

Mi ege ŝatas mian urbon. Mi ĉi tie naskiĝis, mi loĝas ĉi tie la tutan ne tiom longan vivon, kaj mi ne estas indifereenta al ĝi.

Jen antaŭ la elurbiĝo la buso preterveturas stadionon, situantan ĉe la urborando. Siatempo en juneco mi ŝatis ĝin vizitadi por iom kuradi, ne por sportaj atingoj kaj rekordoj, sed simple por iom fortigi la korpon. Ankaŭ ĉi tie mi kun grupo de miaj amikoj ofte ludis pilkon, preferante ne kutime piedpilkan ludon, sed volejbalon.

Mi kaptis mian penson pri juneco. Mi ja estas ne tiom aĝa, nur preskaŭ 30-jara. Sed mi pensas pri mi jam kiel pri ne tre juna persono. Jes-jes, pasos ankoraŭ du monatoj, kaj mi iĝos jam tridekjara. Multon mi sukcesis atingi. Kaj la instituton mi sukcesis bone finstudi, kaj defendis doktoran disertacion. Mi havas bonan kaj interesan laboron, pro kiu oni pagas al mi taŭgan salajron.

Sed ĝis nun mi estas fraŭlo. Mi neniam havis tempon por konatiĝi kun iu virino kaj edziĝi. La tutan tempon mi dediĉadis al lernado, al esploraj laboroj. Kaj entute laŭnature mia karaktero estas ne tiom distriĝema. Eble ankaŭ

pro tio mi ne povis ĝis nun edziĝi.

Kaj jen ni preterveturas lokon, kiu situas tute proksime al la urbo, sed estas certe jam iom ekster ĝi. Ĉi tie komenciĝas la vastaj kampoj de nia regiono. Kaj ĝuste ĉi tie mi siatempe perdis mian virgecon. Iam mi promenadis ĉi tie, strebante atingi proksime troviĝantan akvujon kun pura akvo. Kaj tie mi sukcesis trovi aventuron.

La tiujara aŭtuno estis kolorriĉa. Kaj la vetero konstante ĉarmis. Mi ĉiam ŝatis rigardi naturajn kolorojn kaj promenadis ofte tra apudurbaj lokoj simple por spiri freŝan negasigitan de la aŭtoj aeron, rigardi belajn vidaĵojn kaj certe uzi la eblecon naĝi en pura akvo de la apudurba akvujo.

Ŝi estis proksimume samaĝa kiel mi, pli poste evidentiĝis, ke same virga. Ni renkontiĝis ĉe la akvujo. Kvazaŭ ne atentante la najbaron, ni komence nur kaŝrigardis unu al la alia. Mia denaska modesteco ne permesis al mi la unua komenci ian flirtecon, eĉ ian parolon. Estas ĝuste ŝi, kiu faris la unuajn tiurilatajn paŝojn. Mi jam ne memoras, pri kio estis tiuj demandoj aŭ kiel komenciĝis tiu nia unua interparolo. Ŝajnas, ke ankaŭ ŝi tute ne atendis de si tiun kuraĝecon ekparoli al mi. Eble unue ni parolis pri vetero, ordinare nenion signifanta babilado; poste, se mi ne eraras, ni iom tuŝis politikajn eventojn, parolis pri literaturo, muziko. Kaj jam poste estis stako el fojno. Mi notis ŝian telefonnumeron ie sur papereto, sed la sorto ankoraŭ ne favoris min (aŭ eble male?), kaj tiu papereto ie perdiĝis. Do, tiu nia unua tute hazarda renkontiĝo restis sola, malgraŭ miaj provoj ie ŝin trovi.

Oni diras, ke ĉiu virino memoras sian unuan viron. Sed la samo estas, verŝajne, ankaŭ pri la viroj. Almenaŭ mi la mian memoras tre bone.

Tiu por mi memoriga loko restis ie malantaŭe. Komenciĝis apudurbaj vilaĝoj, tuta serio da senĉesaj unutipaj

vilaĝoj, same bone konataj de mi, ĉar ankaŭ ĉi tie mi sufiĉe ofte estis pro ofica bezonoj.

Do, mi daŭre restas fraŭlo, malgraŭ jam sufiĉa aĝo. Kie fakte mi povas konatiĝi kun virino? Por multaj el la viroj tio ne estas problemo: ili vizitas kafejojn, dancplacetojn, kinejojn. Sed por mi ... Mi ĉion ĉi ne ŝatas. Mi ne scias, pro kio, sed mi opinias, ke viziti tiujn lokojn signifas (almenaŭ por mi) simple perdi tempon, kaj danci mi ne ŝatas, eble pro tio, ke mi ne scipovas bone danci, sed simple skui la korpon, kiel tion faras la nuntempa junularo: por mi tio estas ne interesa. En kafejoj oni kutime preparas aĉan kafon, plezuron ĝin trinki ne eblas ricevi. Mi hejme preparas por mi kafon multe pli bongustan. Mi havas bonajn konatojn kaj amikojn en Armenio, kie fakte tre majstre oni kuiras vere bongustan kafon, kaj tiuj amikoj iom ankaŭ min instruis pri tio ne tiom simpla proceduro. Nu, kaj pri kinejoj eĉ eblas ne paroli. Nuntempe, kiam preskaŭ ĉiu jam havas hejme videomagnetofonon, ne necesas viziti kinejojn: ĉion eblas rigardi hejme.

Do, kion eblas fari nun al unuopuloj similaj al mi? En la oficejo ĉe ni ĉiuj virinoj jam delonge estas edziniĝintaj. Hazardaj konatiĝoj surstrate aŭ en kafejoj, tion mi persone ial preferas eviti. Ĉu restas nur konatiĝi pere de lastatempe multnombro aperintaj anoncĵurnaloj? Sed ankaŭ tie plurfoje aperas sufiĉe strangaj anoncoj, similaj al la sekventa: „Juna virino, kiu konservative rilatas al seksumado, konatiĝus kun samorientita viro, aŭ pli bone kun du aŭ tri samtempe”. Certe tiu anonco plej verŝajne aperis ŝerce. Eĉ mi supozas, ke la telefonnumero estis notita absolute ne ĝusta, falsa. Sed se rigardi aliajn anoncojn, preskaŭ ĉiuj similas unu la alian: „Ĉarma blondulino kun sia 6-jara filo esperas renkonti 25 - 30-jaran viron, kiu povos esti bona mastro en la hejmo kaj patro por la infano”... „50-jara vidvino, kies infanoj estas jam memstaraj, emas trovi proksimume samaĝan viron por kune mastrumi”... „Kie vi estas – zorgema 25-35-jara viro, ŝatanta aventurojn, vojaĝojn?”

Pasis iom da tempo, kaj nia buso



haltis en negranda urbo ĉelime kun nia provinco. Por iom gimnastiki mi eliris. Eĉ kvinminutan paŭzon mi preferas uzi por iomete laborigi la korpon.

Elirante, mi kaptis, eĉ iel eksentis ian kaŝrigardon, ĵetitan al mi de antaŭaj sidlokoj de la buso. Komence mi ĝin ne atentis. Simple io atentigis min. Starante flanke de fumantoj (mi neniel povas kompreni tian kategorion de homoj: ajnan minuton ili emas uzi por enspiri cigaredan fumon, ĉu vere tio alportas ian ĝuon?), mi indiferece rigardis ĉirkaŭen, ankaŭ al pasaĝeroj de nia buso. Kaj mi komprenis, ke inter tiuj estas iu de mi konata. Pli ĝuste, unu el la virinaj vizaĝoj al mi ion memorigis, ion malnovan, delonge forgesitan.

Mi provis fosi en mia memoro, kie mi povis vidi tiun vizaĝon, tiun virinon. Eble tio estis jam antaŭ multaj jaroj – la kapo ne volis al mi helpi. Ĉu io ligita kun mia lernado? Ne! Samlernantojn mi memoras sufiĉe bone. Ĉu kun la ofica aferoj? Des pli ne. Pri laboro mi estas freneza fanatikulo kaj forgesi iun, kun kiu mi kontaktiĝis iam ajn pro la ofica aferoj, mi certe ne povis. Sed kie mi tamen ŝin kontaktis?

Najbara triopo da fumantoj iom malhelpis min: ili tro brue interparolis, rakontante unu al aliaj laŭ sia opi-

nio „freŝajn” anekdotojn¹ kaj tro laŭte ridaĉis. Ŝajnas, ke ankaŭ aliajn ili malhelpis, sed neniu al ili ion diris. Mi iom flanken moviĝis kaj hazarde troviĝis tuj apud iu virino, kiu estis samvojaĝanto de la unuaj vicoj de nia buso.

„Tiu venteto estas ege agrabla”, mi ekaŭdis ŝiajn vortojn. La voĉo estis agrabla, belsona, trankvilinga. Mi rigardis ŝin. Jes, tio estis ĝuste tiu virino, pri kiu mi opiniis, ke ŝia vizaĝo estas iom konata de mi. Multe pli konata de mi estis ŝia voĉo. Kie kaj kiam mi povis kun ŝi kontaktiĝi?

Ĝi estas ne nur agrabla, sed eĉ karesema, mi subtenis tiun ekparolon. Jes la voĉo estis ege konata de mi, same kiel la vizaĝo. Sen tiu ĉi venteto ege sentebles ŝvitiga varmego. Eĉ nun, vespere.

Ni eksilentis. Ankoraŭ pri kio eblas paroli? La ordinaraj priveteraj frazoj. Ĉu sekvus la parolo pri kulturaj aŭ politikaj demandoj? Mia cerbo laboris provante rememori, kie mi ŝin vidis kaj aŭdis. Ja ne estis duboj pri tio, ke tio ĉi iam okazis.

– Nu sufiĉas, Ĵenja. Vi kvazaŭ ne rekonas min.

Kaj ĉi-momente mi ĉion rememoris. Jes, estas ŝia voĉo, kiu helpis min, kiun ne eblis ne rekonu. Ĝi sonis ►

► kvazaŭ najtingala kanto. Kiel mi povis ŝin forgesi? ...

Tio okazis dum unu el miaj ripozperiodoj, proksimume antaŭ kvin jaroj. Mi estis ripozanta post serioza operacio, ŝajne la unuan fojon uzante servojn de ripozdomo, kion mi fakte tute ne ŝatas, ĉiam preferante aktivan ripozon, ĉu vojaĝante ien, ĉu ripozante ie proksime al rivero, en ordinara tendo, kaj okupiĝanta pri fiŝkaptado aŭ kolektado de fungoj kaj beroj. Se mi ne eraras, tio estis la unua fojo, kiam mi absolute ne pensis pri mia laboro, pri eksperimentoj, pri flankenmetita nefinverkita artikolo pri lastaj niaj atingoj. Tutajn tagojn mi sidis ie surbenke kaj legis iajn romanojn, kriminalajn, fantastajn. Vespere mi ŝatis venadi al dancplaceto por simple rigardi la dancantojn, inter kiuj fakte ne estis bonaj dancistoj. Kaj ĝuste dum tiuj vesperoj mi rimarkis ŝin. De la ceteraj ŝi diferenciĝis ĝuste per sia dancmaniero eleganta, alloga por rigardi.

Kiel ŝi nomiĝas? Nun por mi tio estis problemo. Nadeŝda? Ne. Maria? Ankaŭ ne tiun nomon ŝi havis. Sed mi ja devas nepre rememori ŝian nomon por iel turni min al ŝi. Ho, jes. Svetlana. Ĝuste Svetlana. Ŝajnas, ke mi karese tiam nomis ŝin Svetik. Kiel mi povis

ĉion ĉi forgesi?

Certe mi ne kuraĝis la unua ekkontakti ŝin. La eventoj tiam evoluis laŭ ŝia ordo: foje dum mia ripoz-legado de libro surbenke ŝi aliris kaj eksidis apude, kompreneble petante permeson. Poste kiel kutime komenciĝis nenion signifanta babilado. Tiam ni konatiĝis. Kaj jam ne la legado logis min. Mi jam konstante pensis pri nia plua renkontiĝo kaj interparolo. Ŝi evidentiĝis sufiĉe edukita persono. Ŝia profesio estis pedagogo (en estonteco, ĉar tiutempe ŝi ankoraŭ studentis), edukanto de la plej junaj lernejoj. Hejme ŝi havis nur patrinojn, aliajn parencojn ŝi ne havis. Jen fakte ĉion, kion mi sukcesis eksci pri ŝi, krom la nomo.

Tiu nia ĉiutaga babilado poiomete ekaliaspektis kaj transformiĝis je pli proksimaj rilatoj. Jes-jes, eblas esprimi tre proksimajn rilatojn. Subite ŝi malaperis el la ripozdomo, tute ne atendite por mi, ne dirinte eĉ adiaŭan vorteton. Eble io al ŝi okazis. Domaĝe, ke mi ĝis tiu momento ne eksciis, kie ŝi loĝas, kaj certe ne povis ŝin trovi.

Kaj jen tiu hazarda renkontiĝo en la buso.

Kompreneble, post tiu halto en la buso ni sidis jam apude fine de la maŝino. Kaj ĉi tie ni daŭrigis nian in-

terparolon.

– Mi scias, ke ĉe vi ĉio bonordas. Kaj bona laboro, kaj defendita disertaĉio ...

– Ĉu vi interesiĝis pri mia sorto? Sed kiel? Kial? Kaj mi: Mi ja nenion scias pri via nuna stato. Ĉu edzo, infanoj?

– Mi ne scias, kiel al vi klarigi. Jes, mi iom interesiĝis pri via vivo, pri via sorto. Kaj mi ĝojis pro ĉiuj viaj atingoj. La edzo ... Ne, edzon mi ne havas. Pri tio mi eble iam al vi rakontos. Sed la infano ... mi havas ĉarman 4-jaran knabinon Irina (la nomo estis elektita memore al mia patrino). Se vi ŝin vidus (kaj mi tion vere volus), ankaŭ al vi ŝi plaĉus.

„Kvarjara?” mi komencis cerbumi. Kaj ni renkontiĝis antaŭ kvin jaroj. Ĉu eble? ...

Tiuj pensoj plu min turmentis. Mi jam povis pensi pri nenio alia. Jes, tiam kun ŝi estis interese kaj iel trankvile, ia trankvila sento ie interne de la animo. Kun nemultaj virinoj mi sentis min same trankvila. Eble sufiĉas serĉi ankoraŭ iun alian. Nur ŝi estu libera, senedza!

– Pri kio vi pensas? mi ekaŭdis ŝin. – Vi tute min ne aŭskultas.

– Pardonu, nu, certe pri vi, vi ja estas apude.

– Kaj se mi estus fore? ...

– Nu, mi ne scias, ni ne vidis unu la alian kvin jarojn ...

– Certe mi kulpas, ke tiam mi ne atendite por vi lasis la ripozdomon. Hejmaj malfacilaĵoj. Mi eĉ ne sukcesis adiaŭi. Pardonu.

– Kaj mi pensis, ke estas ĝuste mi, kiu kulpas.

– Neni-okaze. Kun vi mi sentis min bone, iel trankvile. Kvankam tiam mi vin fakte tute ne konis.

Ĉu eble jam finiĝis miaj serĉoj? Kaj la persona vivo iel normaliĝos?

La estonteco montros! ...

Dmitrij CIBULEVSKIJ



KRISTINA

1. „freŝa” anekdoto: rusismo, kiu signifas novelpensitan anekdoton, ne ankoraŭ iam sonigitan.

ANONCETOJ

Kvakeroj kredas sendogme, ke al ĉiu homo eblas senpere trovi gvidon el dia fonto, kaj kunvenas en silento por kune inspiriĝi. Kvakera E-Societo aranĝas renkontiĝon en Poznań, Pollando, 28 - 30 majo. Interesiĝantoj bonvenos. Inf. ĉe www.kveker.org/kes_kes.htm aŭ bmaurus@amu.edu.pl aŭ letere al Esperanto - KES, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo.

Akademio ĉe la plaĝo: SUS 30 de AIS San-Marino okazos komence de septembro 2007 en marborda urbo Rimini (Italio). Bonvenas ne nur sciencistoj kaj studentoj, sed ĉiaj intereso. Detaloj: www.ais-sanmarino.org -- klaku al "Anonco pri SUS 30".

Fantomo hantas tra l' mondo. 16-a konferenco por (eks)komunistoj en Dobrichovice, Ĉeĥio, 2007/09/12-16. Aliĝilojn mendu ĉe Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH 4702 Oensingen. Rete: IKEK2007@gmail.com.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provezemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

OSIEK-Konferenco 2007
Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

MITOJ KAJ LEGENDOJ

Atribuada de OSIEK-premio 2007

Postkonferencaj ekskursoj dum 3 tagoj

Informoj, aliĝoj:

- Georgi Mihalkov (Julian Modest)
tel.: (02) 934-42-55 retp.: modest@abv.bg
- Eric Laubacher
tel.: + 33 1 30 96 67 91 retp.: kasisto@osiek.org




<http://osiek.org>

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be